LA TRADUKOJ DE "PINOKJO": KIEL EVOLUIS ESPERANTO INTER 1930 KAJ 2003.*

Davide Astori

Universitato de Parmo (Italio)

"Ogni generazione ha il Pinocchio che si merita"

[Ĉiu generacio havas la Pinokjon, kiun ĝi meritas]

(BUZZATI 1963)

1. Enkonduko

Inter la plej famaj rakontoj por infanoj en la mondo, kaj ne nur (konsiderante la profundan etikan valoron kiu taŭgas ankaŭ al prikonsideroj por plenkreskuloj), *Le avventure di Pinocchio* [*La aventuroj de Pinokjo*] de Collodi, ene de rikolto de tradukoj en multajn fremdajn lingvojn[1], aperas en Esperantujo per du tradukoj (MM 1930, JH 2003), kies ebleco de kontrastiva analizo proponas sin kiel aparte signifa por pripensado pri la evoluo de la vorttrezoro de Esperanto, kaj tratempe (diakronece, dum la tempo de 73 jaroj) kaj nuntempe (la stilo de la traduko de J. Horváth estas vere aktuala).

Parafrazante la famkonatan frazon, elektitan en eksergo, de Dino Buzzati, fama itala verkisto kaj ĵurnalisto de la pasinta jarcento, ni vidos kiel ĉiu generacio havas la esperanton "kiun ĝi meritas", kiu kongruas – kion oni atendus de pli ĝenerala lingvo-teoria aliro – al la grado de evoluado de la komunikilo kaj la socia grupo kiu ĝin uzas.[2]

---

* La aŭtoro dankas elkore al Luigia Oberrauch Madella pro la grandvalora kaj decida lingva helpo en la esperantigo de tiuj ĉi paĝoj.

[1] La 'Fondazione Nazionale Carlo Collodi' [Nacia Fondaĵo Carlo Collodi], fine de la naŭdekaj jaroj, sin bazante sur fontoj de UNESCO, parolis pri pli ol 240 tradukoj: v. GASPARINI 1997: 117. Rilate al tio, ankoraŭ en 1941, Alberto Savinio (pseŭdomino de Andrea de Chirico, frato de la fama pentristo Giorgio de Chirico) signife skribis: "Più di duecento traduzioni di Pinocchio sono sparse per il mondo. Questa perla della nostra letteratura è stata voltata in tutte le lingue parlate e in molti dialetti" [Pli ol ducent tradukoj de Pinokjo disas en la tuta mondo. Tiu ĉi perlo de nia literaturo transformiĝis en ĉiujn lingvojn kaj en multajn dialektojn]. Oni turnu sin por ĉiu ajn pli profunda studado de la fortuno tutmonda de la rakonto de Collodi al la koncerna oficiala TTT-ejo de la Fondaĵo: http://www.pinocchio.it.

[2] Konsiderante la specifan kuntekston, rimarkindas, kiel minimuma bibliografio plej vaste koncernanta la temon de lingva evoluado rilate strikte al la lingvo esperanto, almenaŭ: PIRON s.d., LO JACOMO 1981, ASTORI

2. La du tradukoj

La esperantigado de *Pinokjo*, kadre de la pli ĝenerala tradukstrebo de la Movado,[3] enkorpiĝas, en la konscia propono doni al la monda publiko "mondfama[n] origine itala[n] porinfana[n] klasikaĵo[n]" (NORDENSTROM 2012), samtempe la bezonon, tipan de la minoritataj lingvoj, plenigi la malplenon de materialoj por infanoj (de la ludemaj legaĵoj al la iloj glotodidaktitaj[4]: jen do ke, kiel memorigas MINNAJA 2003, "*La aventuroj de Pinokjo* estis la ĉefa legaĵo por ni, knabetoj".

La impreso de la aventuroj de Pinokjo estis tiel forta, ke en la Movado naskiĝis "La Ludo de Pinokjo", ludo por 2-4 personoj "kun kolorilustritaj kartoj surbaze de la fama infanlibro", [5] kaj esprimoj kiel ekzemple '*havi la Nazon de Pinokjo'* kaj '*esti la Parolema Grilo'* eniris plentitole en la uzon kiel esprimplena heredaĵo de la Internacia Lingvo.

Antaŭ ol eniri en la lingvan analizon, ni donas mallongan prezenton de la du tradukoj.

2.1. MM 1930 (ekde nun nur MM)

La unua traduko kronologie[6] anticipas je 10 jaroj la kinematografian version de Walt Disney. Ĝia aŭtoro estas Mirza Marchesi, bazlerneja instruistino, kiu multe agis cele al la disvastigo de nia Lingvo inter la geinstruistoj.[7]

2015. Tiaj fenomenoj je diakroneca nivelo estas evidenta pruvo de la fakto ke ankaŭ esperanto vivas diakronecan nivelon de evoluo, konfirmante sian naturon de lingvo sub ĉiuj aspektoj.

[3] Por pli specifa enprofundiĝo de la itala kadro estas esenca la legado de MINNAJA 2005 kaj de la pli freŝdata ASTORI 2015b.

[4] "Bambini che sapessero l'esperanto erano a quel tempo molto pochi, l'acquisizione della lingua da parte della nuova generazione tramite l'uso quotidiano in famiglia era all'epoca assai rara" [Infanoj, kiuj konis esperanton, estis tiutempe tre malmultaj, la akiro de la lingvo fare de la nova generacio tra la ĉiutaga uzo en la familio estis tiuepoke tre malofta], memorigas MINNAJA 2007: 119. V. tiurilate ASTORI 2009, 2011c.

[5] Vidu (ankaŭ por ebla aĉeto): http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=801.

[6] La eldono, ilustrita per W.H. Matthews zorge de grafikisto L.N. Newell, estas aŭdebla en la reto, ĉe: mail.cilea.it/~bottoni/eo/pinokjo/index.htm, per la voĉo de Carla Sfardini.

[7] Tiel memorigas ŝin MINNAJA 2003: "La tradukintino estis elementlerneja instruistino, entuziasme aganta en la instruista medio, eĉ menciita per aparta kapvorto en la *Enciklopedio de Esperanto*. Ŝi edziniĝos al meksikia esperantisto kaj iros al Meksikio; post vidviniĝo, ŝi revenos al sia origina loko, apud Padova, kie ŝi mortos en 1953".

Enkondukas ĝin 'Kosmopolito' (iu pseŭdonimo), kiu substrekas, interalie, por rimarkigi la motivojn de la traduko, kiom "homareca" estas la "ora libro" de Collodi, digna do esti "konduk[ita] en Esperantujon" inter la komuna heredaĵo de nia mondo.[8]

La traduko[9] estis represita en 1981, vole de la "Itala Esperanto-Instituto", "destinata [destinita] – kiel memorigis MINNAJA 2003 – solo all'uso interno dei corsisti [preskaŭ nur al

---

[8] Tiel recitas la komenca dediĉo "Al Pinokjo", interesa ankaŭ kiel lingva atesto (Parizo, junion, 1926): "*Pinokjo*, ora libro vekinta korbatojn de boneco en la italaj geknaboj, dolĉajn kortuŝojn de neniu el ili forgesitajn, Pinokjo, juvelo naskiĝinta en la ĝentila *Toscana* kie ĉio estas arto, ci jam ne estas de cia regiono, ci ne estas plu de Italujo, ci estas verko homareca. | En la plej bela senco de la vorto. | Al la homaro cin alportas nun la dolĉa lingvo de Zamenhof, la mirinda lingvo de ĉiuj popoloj. | Bonecon ci instruis al ni, amiko Pinokjo, kiam knaboj ni estis: kaj kiam oni estas knabo oni ne konas la limojn, kaj kiam oni estas homa oni forgesas la barojn. | Cian patrion senliman, senfinan, donu do Esperanto al ci, kara Pinokjo, grandan kiel cia koro. | Ci jam inde igis glora la nomon de cia kreinto: kaj nun al tiu kiu cin kondukis en Esperantujon kaj cin revartis ameme donu ci, ankaŭ en cia nova verda vesto, la fieron pri cia sen morteco".

[9] Tiu traduko ("con minime correzioni, alcune per stare nel tempo di trasmissione, altre per renderlo più comprensibile per radio" [kun etaj korektoj, iuj por resti en la elsenda tempo, aliaj por fari ĝin pli komprenebla per radioaparato], memorigas Carlo Minnaja *per litteras*) eniris la horaron de Radio Romo en 1951. Ankoraŭ MINNAJA 2007: 118-119 tiel atestas pri la restartigo de la esperanta kulturo post la fino de la dua mondmilito: "Con il 1950 iniziano nuovamente le trasmissioni in esperanto a Radio Roma. L'occasione è l'Anno Santo; ma le trasmissioni non sono più esclusivamente turistiche né, tanto meno, politiche. Il caposezione è Ascenzio Blasimme, che già lo era stato nelle trasmissioni anteguerra, e i redattori sono Luigi Minnaja [padre di chi scrive, n.d.r.] e Vincenzo Musella: le scelte dei temi sono più libere e quindi, pur mantenendo il compito di informare sull'Italia e favorire il turismo, le trasmissioni possono essere maggiormente dedicate alla cultura letteraria e a informazioni sull'attività specificamente esperantista. Musella trasmette un ciclo di conferenze che commentano canto per canto la traduzione dell'*Inferno* di Kaloksay; Blastimme e la famiglia Minnaja (Luigi, con la moglie Carolina Minio-Paluello e i figli Nicola e Carlo, *n.n.t.*) mettono in scena Pinocchio: ogni ultimo martedì del mese cinque persone si alternano ai microfoni, per interpretare il narratore, Pinocchio, Geppetto, la Fatina dai capelli turchini e gli altri personaggi del racconto, adattando per la sceneggiatura radiofonica la traduzione di Mirza Marchesi. Entrambi i cicli ebbero un notevole successo tra gli ascoltatori: giunse anche una cartolina di saluto indirizzata a "*Pinokjo*, Radio Roma". Fu apprezzata anche la chiarezza della dizione: la sonorità della voce di Musella seppe dare a Dante una corposità nuova, e la rappresentazione a più voci di *Pinocchio* captò l'interesse e la simpatia di un pubblico abituato a vedere nell'esperanto uno strumento culturale per adulti". ["En 1950 komenciĝas denove la elsendoj en esperanto fare de Radio Romo. La okazo estas la Sankta Jaro; tamen la elsendoj jam ne plu estas ekskluzive turistaj aŭ, eĉ malpli, politikaj. La sekciestro estas Ascenzio Blasimme, kiu jam estris la elsendojn antaŭmilitajn, kaj la redaktistoj estas Luigi Minnaja [patro de la verkisto, n.d.r.] kaj Vincenzo Musella: la elekteblecoj de la temoj estas pli liberaj kaj tiam, eĉ se subtenante la taskon informi pri Italio kaj kuraĝigi la turismon, la elsendoj povas esti pli multe dediĉitaj al la literatura kulturo kaj al informoj pri specifaj esperantistaj aktivecoj. Musella elsendas serion da prelegoj kiuj komentas, kanto post kanto, la tradukon de la *Infero* de Kaloksay; Blastimme kaj la familio Minnaja (Luigi, kun sia edzino Carolina Minio-Paluello kaj la filoj Nicola kaj Carlo, *n.d.t.*) surscenigas *Pinokjon*: ĉiu lastan mardon de la monato kvin personoj alternas ĉe la mikrofonoj, por ludi la rakontanton, Pinokjon, Ĝepeton, la Feinon kun bluaj haroj kaj la aliajn protagonistojn de la rakonto, taŭgigante al la radioaparato la tradukon de Mirza Marchesi. Ambaŭ cikloj estis sufiĉe sukcesaj inter la aŭskultantoj: venis ankaŭ salutkarto adresita al "*Pinokjo*, Radio Roma". Oni ŝatis ankaŭ la klarecon de la prononco; la sono de la voĉo de Musella povis doni al Dante novan

interna uzo de la kursanoj]", kun la enkonduko de Fabrizio Pennacchietti, iama profesoro pri semitistiko ĉe la Torina Universitato, Prezidanto de la Instituto, kiu pridemandas sin pri la "tutmonda fortuno" de la romano, kaj kun noto de la Prezidanto de la Fondaĵo 'C. Collodi', Rolando Anzilotti, kiu substrekas ties gravecon por la Kolodi'a jubileo.[10]

2.2. JH 2003 (de nu nur JH)

Aperas en 2003 nova traduko, sub la sama titolo de *La Aventuroj de Pinokjo*, farita de Jozefo Horváth (pseŭdonimo de Giuseppe Croatini), patronita de la "Flandra Esperanto-Ligo". Ĝi reprenas la originalajn ilustraĵojn de Enrico Marzanti por la unua itala libroforma eldono de la jaro 1883. Kompare kun tiu de la Marchesi, ĝi estas, laŭ MINNAJA 2003, "vortostoke kaj stile pli moderna[. …] La lingvo estas flua kaj facila, kaj la libro estas ege rekomendinda al ĉiu aĝo".[11]

Ĉe la bazo de la pli alta kvalito de la laboro de Horváth estas sendube, unuflanke, la antaŭa sperto de la unua traduko, aliflanke la lingva evoluo kaj, ne laste, la apero, en 1970, de la *Plena Ilustrita Vortaro* [PIV], kiu profunde kontribuis al la evoluo kaj normigado de la lingvo.

3. Unua komparo de la du tradukoj

Ni nun konduku mallonge (laŭ la modelo de MIONI 1973[12]) komparan analizon pli globalan de la du tradukoj, enfokusigante kelkan plej signifan ekzemplon, por poste direkti la

---

plenecon, kaj la reprezentado per multaj voĉoj de *Pinokjo* kaptis la intereson kaj simpation de publiko alkutimigita vidi en la lingvo esperanto kulturan ilon por adoltoj.

[10] "La nova eldono de Pinokjo en internacia lingvo Esperanto plenmerite lokiĝas inter la iniciatoj kaj manifestacioj de la centjara datreveno de l' senmorta ĉefverko, substrekante la universalecon de l' gaja marioneto. | La verko en lingvo Esperanto, krom perceptigi la espriman formon de l'verkisto, estos certa perilo de komunikado kaj punkto de ideala konkordo inter la geknaboj, grandaj kaj malgrandaj de la tuta mondo" (el la vortoj de Anzilotti, en MM 1930).

[11] Tiel recenzas ĝin NORDENSTORM 2012: "Ĝi estas nek simpla nek komplika, sed meznivela. La stilo estas klara, sed ne malriĉa. […] La tradukinto ofte uzas vere Esperantajn esprimojn (groŝo en poŝo, p. 27; mankas klapo en la kapo, p. 117), kiuj ĝuigas la leganton".

[12] Alberto Mioni, iama profesoro pri 'Glotologio kaj Lingvistiko' ĉe la Universitato de Padovo (inter kies unuarangaj sciencaj interesoj troviĝas almenaŭ: la rilato inter majoritataj kaj minoritataj lingvoj, naciaj kaj regionaj lingvoj; dialektoj, lingvoj kaj nacimalplimultoj; la nedisigebla ligilo inter lingvo, kulturo kaj socio; la rilato inter lingvo kaj penso, la tielnomita "Sapir-Whorf hipotezo"; la deviga defio nuntempa pri lingva

atenton (konsiderante ankaŭ la spacajn limigojn) al detala kaj profunda analizo de la diferencoj ekzistantaj inter la malsamaj transdonoj de la unua ĉapitro.

3.1. Fonetika nivelo

Koncerne al propraj nomoj, la plejmulto estas adaptita fonetike: 'Pinocchio': *Pinokjo* MM, JH; 'Geppetto': *Ĝepeto* MM, JH; 'Rosaura': *Rozaŭro* MM - Rozaŭra JH; kaj ankoraŭ: 'Arlecchino': *Arlekeno* MM, JH kaj 'Pulcinella': *Pulĉinelo* MM, JH. 'Mastr'Antonio' prenas la formon de la nomo esperantigita *(Majstro Antono* MM, JH), 'Mastro Ciliegia' estas, en ambaŭ MM kaj JH, tradukita (*Majstro Ĉerizo*). La 'Grillo parlante' forlasas la unuan kunmetitan formon *(Grilo Parolanta - MM)* por la plej ĉiutaga *Parolanta Grilo* JH. Interesaj estas la kazo de 'Mangiafuoco', kiu vidas la unuan formon *Manĝas-fajron* MM jam transformita en la tagoj de Radio Romo (kaj transprenita en JH) en *Fajromanĝulo*, pli proksima al la ena lingvostrukturo kaj eĉ pli al la *Sprachgefühl* de la parolanto, *lingva sento* kiu per la uzo estis malrapide evoluanta. Rilate al 'Polendina', se al la elekto de MM *Polenteto* sekvas eksplika noto de la tradukisto[13], JH uzas *Polento*, kiu nun staris en la uzo de lingvo kun la specifa signifo de *'maizkaĉo'.* Kaj ankoraŭ, por traduki 'Il paese dei Barbagianni', se MM*,* kun *'Lando de la Strigoj'*, uzas la strategion de la klariga noto[14], sukcesa estas la neologismo '*La Lando Azenio'* de JH, je pura endogeneso.

3.2. Nivelo morfosintakta

La strukturo de la cellingvo ne kreas problemon pasante de la fontolingvo. La sola speciala karakterizaĵo menciinda estas la uzo en MM de la dua persona singulara pronomo 'ci' (ja antaŭvidita de la gramatiko, tamen malofte uzata), kiu kaŭzas en la nuntempa leganto senton de malproksimiga arkaismo.

---

demokratio, ne laste en la senso kaj en la uzo de la internaciaj helplingvoj) dediĉis sian atenton al la tradukado de la verko de Collodi (v. specife MIONI 1973, 1990).

[13] "manĝaĵo preparita el faruno de maizo, akvo kaj salo, kiu en kelkaj regionoj de Italujo anstataŭas la panon, precipe ĉe la kamparanoj; maizaĵo. Oni uzas la etvorton por la pli mola polento".

[14] "strigo: nokta raba birdo. Ĉi tie, laŭ itala diro ĝi signifas ankaŭ «kredema, stulta homo»".

3.3. Leksika nivelo

Foriginte tre malmultajn kontraŭtendencajn esceptojn[15], inter la unua kaj dua tradukoj vidiĝas riĉiĝo kaj pliboniĝo de lingvokapabloj. Jen kelkaj ekzemploj, elektitaj ankaŭ paralele por montri, en iuj kazoj, la malfacilaĵojn renkontitajn en la adaptado al malsamaj registroj:

‘dandosi una fregatina di mani’ (ĉap. 1):
interfrotante siajn manojn MM, *kontente kunfrotis la manojn* JH;

‘restò di stucco’ (ĉap. 1):
restis kvazaŭ ŝtoniĝinta MM, *konsterniĝis* JH;

‘bizzosissimo’ (ĉap. 2):
kolerema MM, *kutime facile incitiĝis* JH;

‘buscarmi un tozzo di pane’ (ĉap. 2):
gajni pecon da pano MM, *perlabori al mi iom da pano* JH;

‘brizzolata’ (ĉap. 2):
griza(*n*) MM, *grizeca*(*n*) JH;

‘mille carezze e mille moine’ (ĉap. 12):
mil karesojn MM, *karesis kaj kaĵolis* JH;

‘lucciconi’ (ĉap. 7):
larmoj MM, *larmegoj* JH;

‘piangere e berciare’ (ĉap. 7):
kriegi MM, *plori kaj bleki* JH;

‘battibecco’ (ĉap. 10):
viva(*n*) *disputo*(*n*) MM, *akra*(*n*) *kverelado*(*n*) JH;

[15] Ekzemple, ‘contro le pareti della stanza’ (ĉap.1), kiu lasas la rafinitan *kontraŭ la vandojn de la ĉambro* MM al pli ĉiutaga *kontraŭ la muroj de la ejo* JH.

‘spicca un salto’ (ĉap. 10):
faris salton MM, *faras eksalton* JH;

‘strilla’ (ĉap. 10):
krias MM, *ŝrikas* JH.

Kiel montrita en MIONI (1973: 278, 282), la forta ĉeesto kaj vario de “aspetti e fatti materiali e non materiali di cultura e di vita quotidiana”, “non facilmente rendibili in modo equifunzionale” [aspektoj kaj materialaj faktoj kaj materia kulturo kaj ĉiutaga vivo, ne tiel facile direblaj per la samaj funkcioj], prezentas la defion aparte signifan de la tradukado de *Pinokjo*.
Ekzemple, en la kulinara vortotrezoro, post la kazo nerekta de ‘polenta’, estas tiu de ‘frittata’ (ĉap . 5), kie apud unua *ovfritaĵo* MM staras la mallongigita *fritaĵo* JH, rekonita de la parolanto en ĝia specifeco. Interesa estas poste la kazo de la 'trippa alla parmigiana' (ĉap. 13): la transiro de *tripoj spicitaj per butero kaj fromaĝo* de MM en *tripoj kun Parma fromaĝeto* de JH atestas la internacian akcepton de urbo Parma.
Je soci-kultura nivelo, poste, perdiĝas, ekzemple, la denotacio tute itala de ‘carabiniere’ (ĉap. 3), kiu estas *ĝendarmo* kaj por MM kaj por JH (la sama traduko por la ‘giandarmi’ de ĉap. 11).
Ni venu do al kelkaj ekzemploj de figura kaj metafora uzo kaj al iu idiomatika esprimo (sen povi eniri en la valorojn de ĉiu el ili, la tendenco de MM al JH estas uzi ĉiam pli taŭge kaj, laŭeble, identige la formon plene esperantan):

‘non c’è anima viva’ (ĉap. 1):
ne estas ia estaĵo vivanta MM, *ja eĉ animo ununura ne troviĝas* JH;

‘Buon pro vi faccia!’ (ĉap. 2):
ĝi bone estu al vi! MM, *Multan sukceson!* JH;

‘perse il lume degli occhi’ (ĉap. 2):
perdis la lumon de la okuloj MM, *sentis nebuliĝi la okulojn* JH;

‘se la dava a gambe’ (ĉap. 4):

forkuradis MM, *pelis siajn piedojn* JH;

‘bagnato come un pulcino’ (ĉap. 6):

malseka kiel kokido MM, *malseka ĝishaŭte* JH;

‘castelli in aria’ (ĉap. 9):

kreaĵoj(*n*) *de fantazio* MM, *fantaziaĵoj*(*n*) JH;

‘era sulle spine’ (ĉap. 9):

P. estis kvazaŭ sur dornoj MM, *lin pinĉis-puŝis senpacienco* JH;

‘Numi del firmamento!’ (ĉap. 10):

Dioj de l’ firmamento! MM, *Je ĉiuj dioj!* JH;

‘Felicità!’ (ĉap. 11):

Feliĉon! MM, *Restu sana!* JH.

Kadro riĉa kaj neevitebla estas ankoraŭ almenaŭ tiu de la proverboj, inter kiuj ni elektu, ĉiuj de ĉap. 36:

‘I quattrini rubati non fanno mai frutto’:

Ŝtelitaj moneroj neniam donacas frukton MM , El ŝtelita mono ne venas bono JH;

‘La farina del diavolo va tutta in crusca’:

La faruno de la diablo iĝas tuta brano MM, *Neleĝe akirita ne estas profita* JH;

‘Chi ruba il mantello al suo prossimo, per il solito muore senza camicia’:

Kiu ŝtelas la mantelon al sia proksimulo kutime mortas sen ĉemizo MM,

Kiu ŝtelas la mantelon al sia proksimulo kutime mortas sen ĉemizo JH.

4. Kontrastiva analizo de la unua ĉapitro

Originalo itala (COLLODI 1983)	MM 1930	JH 2003
I. Come andò che Maestro Ciliegia, falegname, trovò un pezzo di legno, che piangeva e rideva come un bambino. **[1]** — C'era una volta... **[2]** — Un re! — diranno subito i miei piccoli lettori. **[3]** — No, ragazzi, avete sbagliato. C'era una volta un pezzo di legno. Non era un legno di lusso, ma un semplice pezzo da catasta, di quelli che d'inverno si mettono nelle stufe e nei caminetti per accendere il fuoco e per riscaldare le stanze. **[4]** Non so come andasse, ma il fatto gli è che un bel giorno questo pezzo di legno capitò nella bottega di un vecchio falegname, il quale aveva nome Mastr'Antonio, se non che tutti lo chiamavano maestro Ciliegia, per via della punta del suo naso, che era sempre lustra e paonazza, come una ciliegia matura. **[5]** Appena maestro Ciliegia ebbe visto quel pezzo di legno, si rallegrò tutto; e dandosi una frega-	I. *Kiamaniere majstro Ĉerizo, lignaĵisto, trovis pecon da ligno kiu ridis kaj ploris kiel infano.* ESTIS iam …. "Reĝo!" – tuj diros miaj etaj legantoj. Ne, miaj knaboj, vi eraris. Estis iam – peco da ligno. Ĝi ja ne estis iu luksa ligno, sed simpla ligno por bruligo, unu el tiuj pecoj kiujn vintre oni enmetas en la hejtilojn kaj kamenojn por ekbruligi la fajron kaj hejti la ĉambrojn. Mi ne scias kiel do okazis, sed fakto estas, ke iun belan tagon tiu ĉi peco da ligno alvenis en la laborejon de maljuna lignaĵisto, kies nomo estis majstro Antono; sed ĉiuj nomis lin majstro Ĉerizo pro la pinto de lia nazo, kiu estis ĉiam brila kaj ruĝkolora kiel ĉerizo matura. Vidinte tiun pecon da ligno, majstro Ĉerizo tuj plenĝojĝis; kaj interfrotante siajn	1. Kiel okazis, ke majstro Ĉerizo, lignaĵisto, trovis lignopecon, kiu ploris kaj ridis kiel infano Estis iam …! —Reĝo! — certe tuj diros miaj malgrandaj legantoj. —Ne, geknaboj, vi eraras. Estis iam lignopeco. Ĝi ne estis io luksa, sed simpla peco el stako, tia, kian vintre oni metas en la fornon aŭ kamenon por bruligi fajron kaj varmigi la ĉambron. Mi ne scias, kiel okazis, sed fakto estas, ke iun tagon tiu lignopeco venis en la laborejon de maljuna lignaĵisto, kies nomo estis majstro Antono, kvankam ĉiuj nomis lin nur Ĉerizo pro makulo sur la nazo-pinto, ĉiam brila kaj ruĝa, simile al matura ĉerizo! Kiam majstro Ĉerizo ekvidis la lignopecon, li tre ekĝojis, kontente kunfrotis

tina di mani per la contentezza, borbottò a mezza voce: **[6]** — Questo legno è capitato a tempo; voglio servirmene per fare una gamba di tavolino. — **[7]** Detto fatto, prese subito l'ascia arrotata per cominciare a levargli la scorza e a digrossarlo; ma quando fu lì per lasciare andare la prima asciata, rimase col braccio sospeso in aria, perché sentì una vocina sottile sottile, che disse raccomandandosi: **[8]** — Non mi picchiar tanto forte! — Figuratevi come rimase quel buon vecchio di maestro Ciliegia! **[9]** Girò gli occhi smarriti intorno alla stanza per vedere di dove mai poteva essere uscita quella vocina, e non vide nessuno! Guardò sotto il banco, e nessuno; guardò dentro un armadio che stava sempre chiuso, e nessuno; guardò nel corbello dei trucioli e della segatura, e nessuno; aprì l'uscio di bottega per dare un'occhiata anche sulla strada, e nessuno. O dunque?... **[10]** — Ho capito; — disse allora ridendo e grattandosi la parrucca — si vede che quella	manojn pro kontenteco, li grumblis duonlaŭte: "Tiu ĉi ligno alvenis ĝustatempe: mi volas uzi ĝin por fari piedon al tableto." Tuj dirite, tuj farite; li prenis la hakilon taŭge akrigitan por komenci forigi el la ligno la ŝelon kaj ĝin ekglatigi, sed kiam li estis fraponta la unuan hakbaton, li restis kun la brako senmova en la aero, ĉar li aŭdis voĉeton subtilan, subtilan, kiu diris, sin rekomendante: "Ne batu min tro forte!" Imagu al vi kiel restis tiu bona maljunulo, majstro Ĉerizo. Li turnis la okulojn timigitajn ĉirkaŭ la ĉambro por ekvidi el kie tiu voĉeto eliris, kaj li vidis neniun! Li rigardis sub la tablo, kaj neniu; li rigardis en ŝranko kiu restis ĉiam fermita, kaj neniu; li rigardis en la korbeto de la segaĵeroj kaj rabotaĵeroj, kaj neniu; li malfermis la pordon de la laborejo por rigardi ankaŭ sur la strato, kaj neiu! Kaj do? … "Mi komprenas," tiam li diris, ridante kaj gratante sian perukon, "verŝajne tiun	la manojn, kaj murmuris duonlaŭte: —Ĉi tiu ligno venis ĝustatempe: mi uzos ĝin por fari el ĝi piedon por tablo. Dirite, farite: senplie li prenis akran adzon por senŝeligi ĝin, sed kiam li ĝuste pretis fari la unuan frapon, lia brako restis en la aero, ĉar li ekaŭdis voĉeton tre mallaŭtetan, kiu diris peteme: —Ne batu min tiel forte! Vi povas imagi, kia miro frapis tiun bonan maljunulon majstron Ĉerizon. Gape li ĉirkaŭokulis en la ejo por vidi, de kie povis veni la voĉeto, sed neniun li vidis! Li rigardis sub la tablon — neniu, rigardis en la ŝrankon cetere ĉiam ŝlositan — same neniu, malfermis eĉ la pordon de la laborejo por elrigardi al la strato — ankaŭ neniu! Aŭ eble? —Mi jam komprenas, — li diris ridetante, kaj gratis sian perukon, — estas

vocina me la son figurata io. Rimettiamoci a lavorare. — **[11]** E ripresa l'ascia in mano, tirò giù un solennissimo colpo sul pezzo di legno. **[12]** — Ohi! tu m'hai fatto male! — gridò rammaricandosi la solita vocina. **[13]** Questa volta maestro Ciliegia restò di stucco, cogli occhi fuori del capo per la paura, colla bocca spalancata e colla lingua giù ciondoloni fino al mento, come un mascherone da fontana. **[14]** Appena riebbe l'uso della parola, cominciò a dire tremando e balbettando dallo spavento: **[15]** — Ma di dove sarà uscita questa vocina che ha detto ohi?... Eppure qui non c'è anima viva. Che sia per caso questo pezzo di legno che abbia imparato a piangere e a lamentarsi come un bambino? Io non lo posso credere. Questo legno eccolo qui; è un pezzo di legno da caminetto, come tutti gli altri, e a buttarlo sul fuoco, c'è da far bollire una pentola di fagioli... O dunque? Che ci sia nascosto dentro qualcuno? Se	voĉeton mi imagis mem. Ni rekomencu la laboron." Kaj repreninte la hakilon, li faligis plenfortegan baton sur la pecon de ligno. "Ho ve ! vi dolorigas min," kriis plende la sama voĉeto. Tiun ĉi fojon majstro Ĉerizo restis kvazaŭ ŝtoniĝinta, kun la okuloj ekster la kapo pro teruro, kun la buŝo larĝe malfermita kaj la lango pendanta ĝis la mentono, kiel maskego de fontano. Apenaŭ li kapablis denove paroli, tremante kaj balbutante pro timego, kiam li ekdiris: "Nu, el kie estas elirinta ĉi tiu voĉeto kiu diris 'ho ve'?... Tamen ĉi tie ne estas ia estaĵo vivanta. Ĉu hazarde ests tiu ĉi peco de ligno kiu estis lerninte plori kaj plendi kiel infano? Tion mi ne povas kredi. Tiu ĉi ligno, jen ĝi estas ĉi tie; ĝi estas peco da ligno por kameno, kiel ĉiuj aliaj, kaj se oni ĵetus ĝin sur fajron, certe oni povus kuiri poton da fazeoloj … Kaj do? Ĉu interne estas iu kaŝita? Se iu	klare: mi ĝin nur imagis. Ni reiru al la laboro. Kaj li reprenis la adzon, donis fortegan frapon sur la lignopecon. —Oj, vi kaŭzas al mi doloron! — kriis plendeme la sama voĉeto. Ĉi-foje majstro Ĉerizo konsterniĝis, liaj okuloj elkaviĝis pro teruro, lia buŝo malfermiĝis, la lango elpendiĝis ĝis la mentono, simile al fontana monstrokapo. Kiam li reakiris la parolpovon, tremante kaj balbutante pro timo li demandis: —Sed de kie venis la voĉeto, kiu diris "oj"? … Ĉi tie ja eĉ animo ununura ne troviĝas. Se ne hazarde ĉi tiu lignopeco lernis plori kaj plendi, kiel infano? Tion mi ne povas kredi. Ĉi tiu peco ja estas ligno ordinara por kameno, kiel ĉiuj ceteraj, kiuj, se ĵetitaj sur fajron, boligas poton da fazeola supo … Aŭ eble? Ĉu iu kaŝis sin ene? Se iu kaŝis

c'è nascosto qualcuno, tanto peggio per lui. Ora l'accomodo io! — **[16]**	estas enkaŝiĝinta, des pli malbone por li. Nun mi servas lin!"	sin, des pli malbone por li. Mi regalos lin per batkuko!
E così dicendo, agguantò con tutte e due le mani quel povero pezzo di legno, e si pose a sbatacchiarlo senza carità contro le pareti della stanza. **[17]**	Tiel dirante, li kaptis per ambaŭ manoj tiun malfeliĉan pecon de ligno kaj komencis ĝin ĵetegi senkompate kontraŭ la vandojn de la ĉambro.	Parolante tiel, li kaptis ambaŭmane tiun malfeliĉan lignopecon, kaj komencis frapi ĝin senkompate kontraŭ la muron de la ejo.
Poi si messe in ascolto, per sentire se c'era qualche vocina che si lamentasse. Aspettò due minuti, e nulla; cinque minuti, e nulla; dieci minuti, e nulla! **[18]**	Poste li atentis por aŭskulti, ĉu aŭdiĝas iu plendanta voĉeto. Li atendis du minutojn, kaj nenio; kvin minutojn, kaj nenio; dek minutojn, kaj nenio.	Poste li ekstaris atende por aŭdi, ĉu la voĉeto ree plendos. Li atendis du minutojn — nenio, kvin minutojn — ree nenio, dek minutojn — same nenio!
— Ho capito; — disse allora sforzandosi di ridere e arruffandosi la parrucca — si vede che quella vocina che ha detto ohi, me la son figurata io! Rimettiamoci a lavorare. — **[19]**	"Mi komprenas," tiam li diris, klopodante ridi kaj taŭzante sian perukon, "klare estas, ke tiun voĉeton kiu diris "ho ve!" mi imagis mem! Ni rekomencu nian laboron."	—Mi jam komprenas, — li tiam diris, kaj klopodis ridi kaj rearanĝi la perukon, — estas klare, ke mi nur imagis la voĉeton, kiu diris "oj"! Ni reiru labori!
E perché gli era entrata addosso una gran paura, si provò a canterellare per farsi un po' di coraggio.	Kaj tial ke granda timo estis lin enpenetrinta, li provis kanteti por iomete sin kuraĝigi.	Kaj ĉar granda timo lin ekregis, li provis kanteti por sin kuraĝigi.
Intanto, posata da una parte l'ascia, prese in mano la pialla, per piallare e tirare a pulimento il pezzo di legno; ma nel mentre che lo piallava in su e in giù, sentì la solita vocina che gli disse ridendo: **[20]**	Dume, flankmetinte la hakilon, li prenis la rabotilon, por raboti kaj elglatigi la pecon de ligno; sed dum li rabotadis ĝin tien kaj reen, li aŭdis la kutiman voĉeton kiu diris al li ridante:	Intertempe li flankenmetis la adzon, prenis rabotilon por prilabori kaj glatigi la pecon. Sed dum li ŝovistiris la instrumenton tra ĝi, refoje li ekaŭdis la voĉeton, kiu petis lin ridante:
— Smetti! tu mi fai il pizzicorino sul corpo! — **[21]**	"Ĉesu! Vi faras al mi tikleton sur la korpo!"	—Ĉesu! Vi ja min tiklas!
Questa volta il povero maestro	Tiun ĉi fojon la kompatinda	Ĉi-foje la kompatinda majstro

Ciliegia cadde giù come fulminato. Quando riaprì gli occhi, si trovò seduto per terra. Il suo viso pareva trasfigurito, e perfino la punta del naso, di paonazza come era quasi sempre, gli era diventata turchina dalla gran paura. **[22]**	majstro Ĉerizo falis kvazaŭ frapita de fulmo. Kiam li remal-fermis la okulojn, li sin trovis sidanta sur tero. Lia vizaĝo aspektis tute aliŝanĝita, kaj eĉ la pinto de lia nazo, de preskaŭ ĉiam ruĝa kia ĝi estis, pro la granda timo estis iĝinta blua.	Ĉerizo falis sur la plankon, kiel fulmofrapito. Kiam li re-malfermis la okulojn, li trovis sin sidanta sur la planko. Lia vizaĝo ŝajnis aliiĝinta, kaj eĉ la nazopinto, kutime ruĝa, fariĝis nun verde blua pro la granda timo.

4.1. Kelkaj prilingvaj konsideroj

Kiel jam dirite en la unua parto de la pli ĝenerala kadro, eblas enfokusigi la atenton sur kelkaj aparte signifaj tendencoj de lingvo-evoluo. Jen sekve, skizitaj kaj ilustritaj per kelkaj elokventaj ekzemploj emerĝintaj de kontrastiva pli detala analizo de la du malsamaj traduksolvoj de la unua ĉapitro de la teksto de Collodi. Ĉiu alineo de la itala teksto estas numerita: al tio ni rilatas por la citaĵoj ene de analizo kaj komparo de la lingvaj materialoj sekve prijuĝitaj.

La tendenco uzi pli ofte ĉiutagaĵojn estas certe unuavice markita per la forlaso, en JH, de la 'ci', sed eĉ fare de la pli vasta endogeneso de propraj nomoj, kiel jam indikite en 3.1.

La *Sprachgefühl*, la lingva sento, materiiĝas en ĉiam pli "denaska" lingvo kaj en la plej plena realigo de ĝiaj eblecoj. Esprimoj kiel ekzemple tiuj priskribitaj tuj sube, kiuj postulus specifan komenton, kiun la limigita spaco de tiu ĉi papero ne permesas, montras klare kiel oni iradas de literatura formo (kelkmaniere pli metieja, kiu ne malofte indulgas al strategio vortvorta) al esprimoj kiuj "sonas pli realaj", pli fluaj , tipaj de parolata lingvo. Ni vidu kelkajn ekzemplojn.

Unue ni registru transpasojn al pli interparolstilaj formoj:

Kiamaniere → Kiel okazis, ke

(*Come andò che* [1])

por komenci forigi el la ligno la ŝelon kaj ĝin ekglatigi → por senŝeligi ĝin

(*per cominciare a levargli la scorza e a digrossarlo* [8])

li estis fraponta la unuan hakbaton → li ĝuste pretis fari la unuan frapon

(*fu lì per lasciare andare la prima asciata* [8])

verŝajne tiun voĉeton mi imagis mem → estas klare: mi ĝin nur imagis

(*si vede che quella vocina me la son figurata io* [11])

li faligis plenfortegan baton sur la pecon de ligno → donis fortegan frapon sur la lignopecon

(*tirò giù un solennissimo colpo sul pezzo di legno* [12])

Tiun ĉi fojon → ĉi-foje

(*Questa volta* [14], [20])

estis tiu ĉi peco de ligno kiu estis lerninte plori → ĉi tiu lignopeco lernis plori

(*questo pezzo di legno che abbia imparato a piangere* [16])

Lia vizaĝo aspektis tute aliŝanĝita → Lia vizaĝo ŝajnis aliiĝinta

(*Il suo viso pareva trasfigurito* [22])

La freŝeco de frazoj komunike trafaj pli ofte fortiĝas per aldono de adverboj taŭgaj por doni la intensecon de la lingvo:

tuj diros → certe tuj diros

(*diranno subito* [3])

li prenis la hakilon taŭge akrigitan → senplie li prenis akran adzon

(*prese subito l'ascia arrotata* [8])

Ne batu min tro forte! → Ne batu min tiel forte!

(*Non mi picchiar tanto forte!* [9])

Mi komprenas → Mi jam komprenas

(*Ho capito* [11], [19])

Emblemaj tiurilate estas la sekvaj du paralelaj kazoj:

kaj neniu […] kaj neniu […] kaj neniu → neniu […]same neniu […]ankaŭ neniu

(*e nessuno* […] *e nessuno* […] *e nessuno* [10])

kaj nenio […]kaj nenio […]kaj nenio → nenio […]ree nenio […]same nenio

(*e nulla* […] *e nulla* […] *e nulla* [18])

En aliaj kazoj, la diferenco estas donita per la leksika elekto:

miaj knaboj → geknaboj

(*ragazzi* [4])

etaj → malgrandaj

(*piccoli* [3])

kiu restis ĉiam fermita → cetere ĉiam ŝlositan

(*che stava sempre chiuso* [10])

hejti la ĉambron → varmigi la ĉambron

(*riscaldare le stanze* [5])

estis iĝinta blua → fariĝis nun verde blua

([*gli*] *era diventata turchina* [22])

La kvalita diferenco povas esti eĉ en la forlaso de krisignoj de gusto kaj klasika ŝajno por aliaj nuntempaj:

Kaj do? … → Aŭ eble?

(*O dunque?...* [10])

Ho ve ! → Oj

(*Ohi!* [13])

Plua plisimpligo de strukturoj ankaŭ apudas al konversacia stilo:

kiu estis ĉiam brila → ĉiam brila

(*che era sempre lustra* [5])

ruĝkolora → ruĝa

(*paonazza* [5])

kaj gratante → kaj gratis

(*e grattandosi* [11])

Kaj repreninte → Kaj li reprenis

(*E ripresa* [12])

klopodante → kaj klopodis

(*sforzandosi di* [19])

de preskaŭ ĉiam ruĝa kia ĝi estis → kutime ruĝa

(*di paonazza come era quasi sempre* [22])

Jen aro da esprimoj kiujn la parolanto rekonas kiel enkorpigantaj la veran esperantlingvan senton:

kiel restis tiu bona maljunulo → kia miro frapis tiun bonan maljunulon

(*come rimase quel buon vecchio* [9])

li restis kun la brako senmova en la aero → lia brako restis en la aero

(*rimase col braccio sospeso in aria* [8])

Li turnis la okulojn timigitajn ĉirkaŭ la ĉambro → Gape li ĉirkaŭokulis en la ejo

(*Girò gli occhi smarriti intorno alla stanza* [10])

el kie tiu voĉeto eliris → de kie povis veni la voĉeto

(*di dove mai poteva essere uscita quella vocina* [10])

restis kvazaŭ ŝtoniĝinta → konsterniĝis

(*restò di stucco* [14])

Apenaŭ li kapablis denove paroli → Kiam li reakiris la parolpovon

(*Appena riebbe l'uso della parola* [15])

Tamen ĉi tie ne estas ia estaĵo vivanta → ĉi tie ja eĉ animo ununura ne troviĝas

(*Eppure qui non c'è anima viva* [16])

kaj se oni ĵetus ĝin sur fajron, certe oni povus kuiri poton da fazeoloj

→ kiuj, se ĵetitaj sur fajron, boligas poton da fazeola supo …

(*e a buttarlo sul fuoco, c'è da far bollire una pentola di fagioli...* [16])

Ĉu interne estas iu kaŝita? → ĉu iu kaŝis sin ene?

(*Che ci sia nascosto dentro qualcuno?* [16])

Nun mi servas lin! → Mi regalos lin per batkuko!

(*Ora l'accomodo io!* [16])

kaj komencis ĝin ĵetegi senkompate kontraŭ la vandojn de la ĉambro

→ kaj komencis frapi ĝin senkompate kontraŭ la muron de la ejo

(*e si pose a sbatacchiarlo senza carità contro le pareti della stanza* [17])

li rabotadis ĝin tien kaj reen → li ŝovis-tiris la instrumenton tra ĝi

(*lo piallava in su e in giù* [20])

Vi faras al mi tikleton sur la korpo! → Vi ja min tiklas!

(*tu mi fai il pizzicorino sul corpo!* [21])

La kongruigo al la "spirito de la lingvo" puŝiĝas ĝis la kreado de esprimoj, idiomaĵoj kaj proverboj tipe esperantaj, kiuj en kelkaj kazoj kodigas sin kiel tiaj:

Tuj dirite, tuj farite → Dirite, farite

(*Detto fatto* [8])

Ni rekomencu la laboron → Ni reiru al la laboro

(*Rimettiamoci a lavorare* [11])

kiel maskego de fontano → simile al fontana monstrokapo

(*come un mascherone da fontana* [14])

kvazaŭ frapita de fulmo → kiel fulmofrapito

(*come fulminato* [22])

Kvazaŭ en serĉado de homeostazo, kie la tradukita teksto estas pli kaj pli for de la originalo por trovi sian aŭtonomecon, sian internan ekvilibron, oni konstatas tendencon al forlaso de strukturaj kalkeoj (plejofte en la adaptiĝo al la ordo de la origina frazo):

vi eraris → vi eraras

(*avete sbagliato* [4])

iun belan tagon → iun tagon

(*un bel giorno* [5])

tiu ĉi (peco da ligno) → tiu (lignopeco)

(*questo pezzo di legno* [5])

kiel ĉerizo matura → simile al matura ĉerizo

(*come una ciliegia matura* [5])

mi volas uzi ĝin → mi uzos ĝin

(*voglio servirmene* [7])

por fari piedon al tableto → por fari el ĝi piedon por tablo

(*per fare una gamba di tavolino* [7])

voĉeton subtilan, subtilan → voĉeton tre mallaŭtetan

(*una vocina sottile sottile* [8])

Imagu al vi → Vi povas imagi

(*Figuratevi* [9])

kaj li vidis neniun → sed neniun li vidis

(*e non vide nessuno* [10])

kun la okuloj ekster la kapo pro teruro → liaj okuloj elkaviĝis pro teruro

(*cogli occhi fuori del capo per la paura* [14])

Koncerne la leksikon, la diakroneca evoluo alportas riĉiĝon (per kreado de neologismoj) kaj la necesan specialiĝon (en la perspektivo de evoluo de mikrolingvoj). Raportante al la pli ĝenerala kadro skizita en 3.3., jen aparte signifaj ekzemploj eltiritaj – ni memoru tion – el la sola unua ĉapitro, temo de la analizo:

hejtilo(n) → forno(n)

(*stufa* [5])

grumblis → murmuris

(*borbottò* [6])

hakilon → adzon

(*ascia* [8])

interne → ene

(*dentro* [16])[16]

[16] Il caso specifico conferma l'analisi riportata in ASTORI 2015a: "Si nota poi, sempre più marcata, la tendenza all'autonomia delle preposizioni a farsi radici, ben attestata già dai primi anni del Movimento, è sempre più diffusa. Ad es.: *ek-*, che genera dal verbo *eki* ("cominciare", classico: *komenci*, più nel significato perfettivo di *starti*) all'avverbio *eke* (all'inizio). La nota in CORSETTI 2005c: 23 di *ene* = dentro "non normalmente usato

sidanta sur tero → sidanta sur la planko

(*per terra* [22])

La ĉiam pli plena kaj matura evoluo de la internaj kapabloj de la lingvo estas atestata en diversaj sektoroj. Ekde la pliigita atento al la akuzativo:

Li rigardis sub la tablo […] en ŝranko → Li rigardis sub la tablon […] en la ŝrankon

(*Guardò sotto il banco* […] *dentro un armadio* [10])

flankmetinte → flankenmetis

(*posata da una parte* [20])

al la etendo de la uzo de la adverbo:

pro kontenteco → kontente

(*per la contentezza* [6])

sin rekomendante → peteme

(*raccomandandosi* [8])

kriis plende → kriis plendeme

(*gridò rammaricandosi* [13])

per ambaŭ manoj → ambaŭmane

(*con tutte e due le mani* [17])

kaj ankaŭ al tiu de aglutinado:

pecon da ligno → lignopecon

(*pezzo di legno* [1])

---

dagli adulti in prosa ma solo in poesia, forma avverbiale regolarmente derivata dalla preposizione *en* = in" si attesta, a distanza di 20 anni, in normale uso, dove ha vinto su *interne*".

la pinto de lia nazo → la nazo-pinto

(*la punta del uso naso* [5], [22])

Aspekto almenaŭ emerĝas kiu ankoraŭ meritas noton: la kreskanta uzo de taŭgaj preverboj, kiuj, ekde unua literatura uzo, ne aparte taŭga kaj adekvata, lasas la paŝon al la evoluo de sentokapablo ĉiam pli aspekta, kunnaskita kun la naturo de esperanto. Jen kelkaj ekzemploj:

majstro Ĉerizo tuj plenĝojĝis → li tre ekĝojis

(*si rallegrò tutto* [6])

aŭdis → ekaŭdis

(*sentì* [8])

rigardi ankaŭ sur la strato → elrigardi al la strato

(*dare un'occhiata anche sulla strada* [10])

kaj la lango pendanta → la lango elpendiĝis

(*colla lingua giù ciondoloni* [14])

Poste li atentis por aŭskulti → Poste li ekstaris atende por aŭdi

(*Poi si messe in ascolto* [18])

Kaj tial ke granda timo estis lin enpenetrinta → Kaj ĉar granda timo lin ekregis

(*E perché gli era entrata addosso una gran paura* [20])

li aŭdis la kutiman voĉeton → refoje li ekaŭdis la voĉeton

(*sentì la solita vocina* [20])

En la sekvaj kazoj, male, la decido forlasi la preverbon (pli ofte pro literaturaj kialoj) celas pli interparolan stilon:

ekvidi → vidi

(*vedere* [10])

ekbruligi (la fajron) → bruligi

(*accendere* [5])

alvenis → venis

(*capitò* [6])

elglatigi → glatigi

(*tirare a pulimento* [20])

5. Konkludoj

Kiel evidentiĝas fare de la kvankam mallonga "birdfluga" analizo, *punctum dolens*, doloriga punkto, de la tradukado de *Pinokjo* (signo de la pli ĝenerala problemo de Esperanto eĉ nuntempa) estas la demando de registroj,[17] kiu kondukas al la risko ke – por repreni MIONI 1973: 291 – "l'arguzia collodiana veda […] spuntate molte delle sue armi" [la spriteco de Collodi vidu [...] malakrigitaj multajn de siaj armiloj]: la kvalita salto inter MM 1930 kaj JH 2003 demetas tamen favore de la eblo (kaj de la procezo) de pliriĉiĝo de la lingvo.

Rilate poste al la antaŭjuĝo, ofta ankoraŭ je scienca nivelo, pri la neebleco de planlingvo kapabli adaptiĝi al la diversaj kampoj semantika-komunikaj (sur la malsamaj niveloj diafasika, diastratika, ktp. ktp.), la prikonsidero ke

> "[o]gni lingua, se c'è chi la sa adattare e rinnovare, se c'è cioè l'uomo di scienza che riesca a superare le barriere della "logica naturale", può esprimere qualsiasi concetto" (MIONI 1970: xx-xxi)
>
> [ĉiu lingvo, se estas tiu kiu scias kiel adapti kaj renovigi ĝin, tio estas, se estas sciencisto kiu kapablas superi la barojn de la "natura logiko", povas esprimi ĉiun ajnan koncepton]

[17] Por specifa tiutema pliprofundiĝo v . ASTORI 2010c .

konfirmas esperanton kiel lingvo en ĉiuj aspektoj[18]: la komparo inter la du tradukoj montras klare kaj sendube kiel ĝi estas evoluanta kun ĉiam pli granda konscio ankaŭ en mikrolingvaj faksektoroj.[19]

Kiel proponema konkludo de la pado ĝis tie ĉi trairita, ni permesas al ni unu lastan penson, jam en ASTORI 2015c, deziron rilate al la plua riĉiĝo de mikrolingva heredaĵo de la lingvo de Zamenhof en sektoro kiu estas al ni aparte kara[20]:

> "En 2016 okazos la jubileo de la *Cours de linguistique générale* [*Kurso pri ĝenerala lingvistiko*] de Ferdinand De Saussure (SAUSSURE 1974 [1916])[21]. Ĉu la esperantoparolantaro sukcesos realigi *Fakan lingvistikan terminaron*?".

---

[18] Malproksimen kondukus, por plua pruvo de tio kion oni asertas, la pliprofondiĝo pri la rilato inter lingvo kaj identeco, pri kiu la aŭtoro de tiu ĉi kontribuo longe pensadis - vidu. ASTORI 2008, 2010a, 2011a, 2011b.

[19] De la sciencoj (interalie substrekinda la rimarko de BARANDOVSKÁ-FRANK 2009: 10: "AIS kaj Akademio Komenius estas vivanta pruvo de tio, ke planlingvo esence kapablas plenumi komunikan rolon en la sciencoj") al la religio: la limigita spaco ne permesas ekadrigi en la prikonsiderojn de MIONI 1984 unuflanke la uzon de E-o kiel lingvo de evangelizado (ekz., per la traduko de la roma Meslibro, v. ASTORI 2013), aliflanke la intencon de la pramovado krei, tra la dua komuna lingvo, duan komunan kulturon kiu instigu al la disvastigado de *homaranismo* (v. ASTORI 2010d).

[20] Intertempe la Premio 'Canuto' per ĝia lasta volumo (ASTORI 2014b) almenaŭ el vidpunkto lingvistika komencis montri, kiel substrkis Michela Lipari en ŝia enkonduka saluto, ke "la esperantista mondo [scipovas] produkti sciencan literaturon en esperanto, ankaŭ pliriĉigante tiun fakvortaron kiu estas inter la ĉefaj indikiloj de la vivanteco de ĉiu ajn lingvo, kaj aliflanke […] ke en esperanto eblas verki libron absolute science digna, subtenatan de unuarangaj diŝiplaj personecoj".

[21] Tiu Ferdinand de Saussure, kiu, en lia fama teksto kiu emerĝis kiel la angula ŝtono de la moderna lingvistiko, dufoje citis la kreaĵon de Zamenhof (v. ASTORI 2010b por plua diskuto kaj bibliografio).

Bibliografio

Astori D. 2008. "Pianificazione linguistica e identità: il caso emblematico dell'Esperanto". *Metabasis. Filosofia e comunicazione* 5I (on line: www.metabasis.it).

Astori D. 2009. "Alfabetizzazione dei bambini: *esperanto* e '*ivrit* a confronto. / Poducavanje dece: *esperanto* i '*ivrit* na poredjivanju". Comunicazione all'*International Congress of Applied Linguistics* in *Applied Linguistics Today: between Theory and Practice* organizzato dall'"Association of Applied Linguistics of Serbia" presso l'Università di Novi Sad, Serbia, 31.10 – 1.11. 2009.

Astori D. 2010a. "Kies lingvo estas esperanto?". En: D. Blanke (Red.). *Esperanto kaj aliaj lingvoj – konstrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj* (Aktoj de la 31ª "Esperantologia Konferenco", Roterdamo 2008), UEA, Roterdamo, pp. 117-120.

Astori D. 2010b. "Saussure e l'Esperanto all'interno del dibattito (inter)linguistico sulle lingue internazionali ausiliarie nell'Europa di inizio sec. XX". *Atti del Sodalizio Glottologico Milanese* Vol. III n.s. (2010 [2008]), pp. 102-120.

Astori D. 2010c. "How "to age" a language: the 'arcaicam esperantom' of Manuel Halvelik / Come "invecchiare" una lingua: l''arcaicam esperantom' di Manuel Halvelik / Kiel "maljunigi" lingvon: la 'arcaicam esperantom' de Manuel Halvelik". En: V. Barandovska-Frank (Red.) *Litera scripta manet. Serta in honorem Helmar Frank*, Akademia Libroservo, Paderborn-Praha 2010, pp. 97-111.

Astori D. 2010d. "Comunicazione internazionale e libero pensiero: Esperanto tra pianificazione linguistica e religiosa / Internacia komunikado kaj libera penso: Esperanto inter lingvistika kaj religia planado". *Inkoj* 1/2 (2010), pp. 154-193.

Astori D. 2011a. "Creazione linguistica e identità socio-nazionale: da Alessarco di Macedonia all'Isola delle Rose". En: P. Valore (Red.), *Multilingualism. Power and Knowledge*, Edistudio, Pisa, pp. 145-158.

Astori D. 2011b. "La *esperanta espero* fra creazione linguistica e costruzione identitaria". *Paideia* 66 (2011), pp. 383-403.

Astori D. 2011c. "Fumetto e identità: fra coesione sociale e tutela delle minoranze". En: T. Zemella (red.). *Il traduttore visibile. La traduzione a stringhe e strisce – La prassi traduttiva*, Parma, MUP Editore, pp. 39-54.

Astori D. 2013. “Tradurre il Messale in una lingua pianificata”. En: D. Astori (red.), *Produrre “quasi” lo stesso effetto. Quindici passeggiate nei boschi traduttivi*, Parma, Bottega del Libro Libreria Editrice, pp. 41-50.

Astori D. 2014a. *Esperantaĵoj. Dek ses itineroj esperantologi-interlingvistike*. Milano: FEI.

Astori D., red. 2014b. *La Premio «G. Canuto» por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio. Kvin jaroj da (inter)lingvistikaj pliprofundigoj en Parma*. Milano: FEI.

Astori D. 2015a. En: Buccino G. – Mezzadri M. (red.), *Glottodidattica e neuroscienze: verso modelli traslazionali*, Cesati, Firenze 2015, en presado.

Astori D. 2015b. “*Pinokjo*. Tradurre collodi in una lingua pianificata”. En: M.G. Busà – S. Gesuato (red.), *Lingue e contesti. Studi in onore di Alberto M. Mioni,* Cleup, Padova 2015, en presado.

Astori D. 2015c. *Inter scienca komunikado kaj lingvaj rajtoj (el la itala vidpunkto en eŭropan kadron). Memore al Arrigo Castellani*. Monografia numero de *Scienca Revuo* 231 (2015), aperonta.

Barandovská-Frank V. 2009. “Kiel planlingvoj povas helpi la sciencon?”. *Teleskopo-Internacilingva Scienca Revuo* 1 (2009), enrete: http://www.teleskopo.com/kiel%20planlingvoj%20povas%20helpi%20la%20sciencon.pdf

Buzzati D. 1963. Enkonduko al: Collodi C., *Le Avventure di Pinocchio*, Vallardi, Milano 1963.

Collodi C. 1983. *Le avventure di Pinocchio. Storia di un burattino*, Testo tratto dall'Edizione Critica edita dalla Fondazione Nazionale Carlo Collodi in occasione del Centenario di Pinocchio (1983), a cura di Ornella Castellani Pollidori con il patrocinio dell'Accademia della Crusca, Fondazione Nazionale Carlo Collodi, Pescia, 1983. (http://www.pinocchio.it/pagine/traduzione_testo/LeAvventure_di_Pinocchio.pdf)

Corsetti, R. 2005c. “L’esperanto dalla nascita: tra creatività e creolizzazione – alcuni aspetti dell’apprendimento della lingua internazionale dalla nascita”. *L’esperanto* 36 (2005) – n.° 9 (monografico).

Gasparini G. 1997. *La corsa di Pinocchio*. Milano: Vita e Pensiero.

JH 2003 = C. Collodi, *La aventuroj de Pinokjo*, trad. Jozefo Horváth, Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen 2003.

Lo Jacomo F. 1981. *Liberté ou autorité dans l’évolution de l’espéranto*. Paris: Author.

Minnaja C. 2003. “Marioneto ĉiam aktuala” (recenzo al: JH 2003). *Monato* 6 (2003), p. 20.

Minnaja, C. 2005. Un *secolo di traduzioni letterarie dall'italiano in esperanto (1890-1990)*, Tesi di Laurea in Storia, Univ. Ca' Foscari, rel. R. Ricorda, a.a. 2004-2005.

Minnaja C. 2007. *L'Esperanto in Italia. Alla ricerca della democrazia linguistica*, Padova, Il Poligrafo [Ricerche – Collana della Facoltà di Lettere e Filosofia dell'Università di Venezia. Presentazione di Ricciarda Ricorda].

Mioni A. 1970. *Presenza e attualità di Whorf nella linguistica*, introduzione a B.L. Whorf, *Linguaggio, pensiero e realtà*, Torino, Boringhieri, pp. IX-XXIII.

Mioni A. 1973. "Le traduzioni del «Principe» e di «Pinocchio» in lingua swahili". En: AA.VV., *La traduzione. Saggi e studi*, Lint, Trieste 21973, pp. 273-294.

Mioni A. 1984. "Una lingua per la religione: problemi sociolinguistici". En: AA.VV., *Memoria del sacro e tradizione orale*, Messaggero, Padova 2984, pp. 277-291.

Mioni A. 1990. "Pinocchio in Africa Nera". En: G. Peron (red.), *Premio Città di Monselice per la traduzione letteraria e scientifica* 15-16-17, Amministrazione Comunale, Monselice 1990, pp. 24-39.

MM 1930 = C. Collodi, *La aventuroj de Pinokjo, travivaĵoj de iu marioneto*, Tradukis el la itala originalo Mirza Marchesi, The Esperanto Publishing Company Ltd., London 1930 (represita fare de Itala Esperanto-Instituto, 1981).

Nordenstrom L. 2012. "Infanlibro en ne tro komplika lingvaĵo" (On line: http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6947&id=1434&recenzo=montru#ek).

Piron C. *s.d*. "Evolution is Proof of Life – A few notes on the evolution of Esperanto" (http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/evolution.htm).

PIV = Waringhien G, a cura di. (1970) *Plena Ilustrita Vortaro* Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda (con 'Suplemento' del 1987, rielaborazioni del 2002 e 2005, versione on line del 4 aprile 2012: http://vortaro.net/).

Saussure F. 1974 [1916]. *Cours de linguistique générale*, publ. par Charles Bailly et Albert Sechehaye avec la collaboration de Albert Riedlinger. Paris: Payot.

Resumo. Komparante la du tradukojn de la fama rakonto de la itala Carlo Collodi (MM 1930, JH 2003), oni intencas esplori la evoluo de la vorttrezoro de Esperanto, samtempe tratempe (diakronece, dum la tempo de 73 jaroj) kaj nuntempe (la stilo de la traduko de J. Horváth estas vere aktuala).

Davide Astori, magistreco pri Beletro je klasika orientiĝo, doktoreco pri romanidaj lingvoj (LMU–Munkeno), diplomo pri paleografio (Ŝtata Arkivo de Parmo), ĵurnalisto, post instruado de la 'Lingvo rumana', 'Lingvo kaj kulturo hebrea', 'Lingvo araba' kaj 'Sanskrito' estas asociita profesoro pri 'ĝenerala lingvistiko' ĉe la Universitato de la Studoj de Parmo (Italio). Liaj ĉefaj interesoj: kontakto inter lingvoj kaj kulturoj, tradukscienco, lingvoj kaj mondkonceptoj, lingvaj kaj sociaj minoritatoj, soci-lingvistikaj aspektoj de naciaj identecoj. Inter la plej freŝdataj sciencaj eldonaĵoj estas almenaŭ: *Regalità e comando nel lessico greco* ("Quaderni di Paideia") 2008 (enkonduko de Prof-ro M. Negri, IULM – Milano); *La* Vita di Bertoldo *di Giulio Cesare Croce nella versione del manoscritto n. 328 (230) del Fondo Zabelin 45641 del Museo storico di Mosca*, Editura Brumar, Timişoara 2011 (enkonduko de Prof-ro Th. Krefeld, Ludwig-Maximilians-Universität – Munkeno); *Pagine mediterranee fra lingue, culture, identità. Riflessioni a cavallo di multilinguismo, multiculturalismo ed esperantologia*, Torri del Vento Edizioni, Palermo 2012; *Esperantaĵoj. Dek ses itineroj esperantologi-lingvistike*, FEI, Milano 2014; *Fortini–Sereni: la grande amicizia*, Tapirumé, Cremona 2014.

Jam konsiliano de IEJ kaj nun vicprezidanto de FEI, li estas la organizanto de la Premio "Canuto" por la plej bona doktora disertacio pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temaroj, kaj li sekvis dum la lastaj jaroj, kiel referanto, doktorigajn tezojn pri temoj rilataj al interlingvistiko kaj Esperantologio. Okaze de la v-a fojo de la Premio, li kuratelis la volumon: *La Premio «G. Canuto» por magistriĝa disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio. Kvin jaroj da (inter)lingvistikaj pliprofundigoj en Parma*, FEI, Milano 2014.

Specife pri la lingvo internacia li verkis pli ol 25 publikaĵojn; jam konsiliano de IEJ kaj nun estrarano de IEF, ekde 1999 li prelegis multfoje, en fakaj konferencoj kaj komunikadoj, en Italujo kaj eksterlande. Kun la eseo "La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj homaranismo" li gajnis la (unuan) Premion "Luigi Minnaja" de la Belartaj Konkursoj de UEA 2011 (la prelego estas aŭdebla ĉe: http://www.youtube.com/watch?v=stW8V1AZ-VM).